


esperanto



DECEMBRO 1991 • 84-A JARO • N-RO 1032 (12)

ISSN 0014-0635



- Esperanto en la politikan batalon!
- De Adamson ĝis Ĥoĥlov: jaro de jubileoj
- Kiu revizios nian plej gravan vortaron?

Invito al ĝojo
La Tago de la Esperanta Libro

Respondo al malesperaj krioj

Se iu erare pensas, ke la tuta laboro de la Centra Oficejo de UEA konsistas el kotiza administrado, plenumado de mendoj, pretigado de la revuo aŭ kongresa organizado, tiun la direktoro plej volonte konatigas kun la "Kanada Ĉambro" en la dua etaĝo de la domo Nieuwe Binnenweg 176. Tie troviĝas la kerno de la biblioteko de UEA; kaj bela meblaro, farita el tipe kanadaj lignopecoj, invitas la vizitanton tuj pasigi iom da tempo inter miloj da libroj.

En Roterdamo estas de preskaŭ tridek jaroj unu el la tri plej grandaj bibliotekoj de Esperanto, apud tiuj de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno kaj de la Esperanto-Asocio de Britujo. Ĝi nomiĝas "Biblioteko Hodler". Origine kolekto de Svisa Esperanto-Societo, post la fondo de UEA (1908) la tiutempe ĉirkaŭ 800 titoloj transiris al la posedo de Hector Hodler, la fondinto de UEA. Post la morto de Hodler en marto 1920, la biblioteko fariĝis propraĵo de UEA. Kvankam la administra centro de UEA translokiĝis unue al Britio kaj poste al Nederlando, la Biblioteko Hodler restis en Ĝenevo, administrate de Hans Jakob, ĝis en 1962 la intertempe granda biblioteka materialo transiris al la nova domo en Roterdamo. Per la malavara donaco de s-ino Dorothy N. Henderson el Kanado ĝi trovis novan, dignan hejmon en aparta ĉambro en la centro de la movado.

Konstanta kresko

Dum la postaj jardekoj la biblioteko plue ekspansiis, ne nur pro la ĉiujaraj novelдонаĵoj, sed ankaŭ pro la riĉiĝo je antaŭe mankintaj titoloj, akiritaj per testamentado, intersanĝo aŭ aĉeto. Tial ĝia materialo intertempe okupas duan kaj, grandparte, trian ĉambron de la domo. Laŭ kruda takso, la biblioteko nun ampleksas pli ol 13 000 librojn kaj broŝurojn, kompletajn kolektojn de kelkcent periodaĵoj, manuskriptojn, vidbendojn, diskojn, kasedojn, insignoj, afiŝojn k.a. Malfacile la esploranto pri Esperanto kaj interlingvistiko aŭ la interesiĝemulo pri nia kultura tradicio povus aliloke proksimiĝi al tiel varia kaj valora materialo.

La esprimo "proksimiĝi" tamen aludas mankon. Nome, estas facile eniri la bibliotekajn ĉambrojn kaj rigardi la plenŝtopitajn bretojn. Sed daŭras, ĝis oni iom orientiĝas. Kaj eĉ pli malfacile estas rapide trovi difinitajn titolojn. La libroj estas ordigitaj laŭ la jaro de eldono kaj ene de ĝi alfabete laŭ titolo. (Tamen, malgrandaj libroj kaj broŝuroj troviĝas en skatoloj.)

*Cent jaroj de vivanta
kulturo ne nur riĉigas nin:
ili kunportas ankaŭ devojn.
UEA nun streĉas siajn
fortojn por meti en ordon
sian faman bibliotekon.
Kiel vi povas kontribui?
Per la Biblioteka Fondaĵo.*

Kelkaj periodaĵoj estas binditaj, sed granda parto estas en skatoloj aŭ staras sur breto. Kiu serĉas titolon, povas provi konsulti provizoran sliparon de libroj, faritan de Robert Moerbeek, kiu dum multaj jaroj plenumis la plej urĝajn bibliotekajn taskojn, aŭ kartaron de la periodaĵoj, parte hereditan de Hans Jakob kaj poste, ekde 1963, prizorgatan dum multaj vesperaj horoj de Victor Sadler. Sed homo iom kutimiĝinta al ordinara bibliotekaj servoj povas nur malesperaj krei, kiel laŭ propra konfeso ofte faris Roger Blaine, usona volontulo, kiu en la junia numero de *Esperanto* en 1987 bildece rakontis pri siaj provoj ordigi la bibliotekon ("Tra densa polvnuvo briletas la celo...").

Unuvorte, la fama Biblioteko Hodler estas apenaŭ uzbla por serioza studo. Tion eblis toleri ĝis certa grado, dum la asocio devis dediĉi sin al aliaj gravaj taskoj, ekzemple la komputiligo de la administrado. Sed nun ĉiam pli sentiĝas la biblioteka malordo – nun, kiam multe pli ofte ol antaŭ du-tri jardekoj Esperanto, la lingvo, la literaturo, la movado, iĝas temo de universitataj

tezoj aŭ kiam homoj en orienta Europo, longe fortranĉitaj de la movada centro, finfine volas konsulti la esencan fontmaterialon pri nia historio. Tial la Estraro de UEA en sia lasta marta kunsido faris gravan, delonge necesan decidon: ĝi decidis krei fondaĵon, kiu ebligu financi la ordigon de Biblioteko Hodler.

Komuna katalogado

La ĉefa tasko estas registri la librojn por fine havi katalogon. Tiu registrado okazos komputile, per programo speciale ellaborita por bibliotekaj bezonoj. Dum du kunsidoj de spertaj konsilantoj – la germanoj Klaus Sailer (profesoro en la Altlernejo pri Biblioteka Scienco en Stuttgart), Utho Maier, Johann-Andreas Pachter kaj Martin Weichert, kaj la nederlandano Robert Keetlaer, civilservanto portempe prizorganta ankaŭ la bibliotekon, la gvidlinioj de la katalogado estis fiksitaj. Al tio apartenas la rekomendo utiligi la jam ekzistantan datumaron (kiu enhavas ĉirkaŭ sep mil titolojn) de la biblioteko de Germana Esperanto-Instituto en Aalen. Tio helpas ŝpari tempon kaj monon kaj komune kolekti spertojn por la starigo de kontaktoj kun aliaj bibliotekoj. Krome, la intenco estas dekomence sentigi al interesiĝantoj la efikon de la katalogada laboro, kaj pro tio oni celas kiel eble plej baldaŭ publikigi la unuajn kontribuojn al, kiel dirus Ludovikito, "espereble iam kompletigota" Plena Bibliografio de Esperanto, ekzemple liston de ĉiuj verkoj aperintaj antaŭ la jaro 1900.

La laboro, komplika precipe en la komenco, ne estos farebla de oficisto aŭ volontulo kiu dediĉas al tio nur parton de sia laborotempo aŭ eksterdeĵorajn horojn. Necesas komisi pri ĝi homon plentempe dum almenaŭ du jaroj. El la normala buĝeto de UEA ne eblas pagi la bibliotekiston. Tial estis starigita la fondaĵo. Ĉu troviĝos sufiĉe da homoj, kiuj dividas nian zorgon pri la konservo kaj ordigo de trezora biblioteko kaj povos helpi, ke la difinon de bezono sekvu agoj?

Ulrich Lins

Donacojn al la Biblioteka Fondaĵo, kiel al aliaj fondaĵoj de UEA, oni povas sendi pere de la landaj perantoj aŭ rekte al poŝta aŭ banka konto de UEA. Detaloj troviĝas sur p. 29-35 de la Jarlibro.